


juna amiko

februaro 2017 • n-ro 1/2017 (150)



INTERNACIA
ESPERANTO-REVUO
DE ILEI
POR LERNANTOJ
KAJ KOMENCANTOJ

Juna Amiko jubileas!
Blanka kavaliro de lago Van
2017 - La Jaro de Zamenhof
Festivalo de poezio kaj prozo
Konversaciaj temoj: Jubilea bankedo





Enhavo



Enkonduke: Karaj amikoj! (Stano Marček, SK); Karaj legantoj! (Mireille Grosjean, CH) 4



Konversaciaj temoj: Jubilea bankedo (Judit Felszeghy, HU) 5



LUME: El mia kolora vivo (Pavel Rak, CZ) 10



Juna Amiko jubileas! Tiu ĉi estas la 150-a numero! 12



LUDE, la unika dua etaĝo: Kies gasto mi estas, ties feston mi festas (Mónika Molnár, CH) 13



Nature: Blanka kavaliro de la lago Van (Lida Elbakjan, AM) 16



Simioj (Jose de J. Campos Pacheco, CU) 17




Legu kaj ĝuu: Knabo sub verda stelo. Ĉio komenciĝis ĉe la verda. Doktor Esperanto – komikso pri Ludoviko Zamenhof (Małgosia Komarnicka, PL) 18



Ekkonu mian landon pere de ĝiaj legendoj: Esperantujo (Małgosia Komarnicka, PL) 20

Rakonto: Rakonteto por harpisto (Malou Scheidegger, CH) 21



Vortbeleco en Esperanto Festivalo de poezio kaj prozo (Małgosia Komarnicka, PL) 23



Kantu kun Juna Amiko: La sorĉa kanto-mondo (Małgosia Komarnicka, PL) 25



Interkultura Mondo: Interkultura Mondo Gratulas! (Elena Nadikova, RU) 26



Lernado: Esperanto por ĉiuj! (Heike Pahlow, DE) 30



Kalendaro Esperanto 2017 (www.lingolia.com) 31



Pripensoj: Neklaraj limoj (Mireille Grosjean, CH) 32

Recenzo: *Neĝa infano* (Luiza Carol, IL).

Enigmoj pri Japanio (Hori Jasuo, JP) 33

Bildstrioj (Sonmy Álvares, CU) 34



LASTE: 2017 – La Jaro de Zamenhof (Stefan MacGill, HU/NZ) 37

Landaj Perantoj 38

Eldonanto de Juna amiko: Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI). Jura sidejo: Centra Oficejo de UEA, Roterdamo, Nederlando. **Retejo:** sub rekonstruo ĉe ilei.mondo.info. Ĉefaj informoj pri *Juna Amiko*: <http://ilei.info/revuoj/?lingvo=eo>. Historio de la revuo: http://eo.wikipedia.org/wiki/Juna_Amiko. La numeroj de 0 ĝis 138 (1972 ĝis 2014) estas publike legeblaj ĉe: <http://www.eventoj.hu/juna-amiko/>. Vidu ankaŭ [lernu.net](http://www.edukado.net) kaj [edukado.net](http://www.edukado.net). **Redaktoro:** Stano Marček (Zvolenská 15/21, SK 036 01 Martin, Slovakio), stano.marcek@gmail.com aŭ redakcio@gmail.com. **Lingvaj reviziantoj:** Karine Arakeljan (Armenio), Trezoro Huang Yinbao (Ĉinio), Doi Ĉieko (Japanio). **Rubrikestroj:** Judit Felszeghy, Stefan MacGill (ĉiuj el Hungario), Małgosia Komarnicka (Pollando), Mónika Molnár (Svislando), Elena Nadikova (Rusio), Luiza Carol (Israelo). **Kunlaboranto:** Raita Pyhälä (FI). Presita en Slovakio. **Administranto:** Sebastian Cyprich, ILEI.Oficejo@gmail.com. **Landaj Perantoj** sur la p. 38. La sekva numero aperos en majo 2017. **Limdatoj por sendi kontribuadojn:** ĝis la fino de januaro, aprilo, aŭgusto kaj oktobro. **Jarabono** €18 en tiel nomataj A-landoj kaj €13 en B-landoj, laŭ la kategorioj de UEA (€15 kaj €12 por mendo de 3 aŭ pli da ekzempleroj al la sama adreso).

ISSN 0230 1318



Karaj amikoj!

Vi ĵus ricevis la jubilean, jam la 150-an numeron de *Juna Amiko*! La numero plurloke okupiĝos pri tiu bela jubileo: La rubriko “Konversaciaj temoj” rakontas pri jubilea bankedo, sed ĉe la fino okupiĝas ankaŭ pri “nia” jubileo. El la artikolo “Juna Amiko jubileas!” vi ekscios pri la historio de *Juna Amiko* kaj pri ĝiaj redaktoroj. Ankaŭ la rubriko “LUDE” bele omaĝas nian jubileon. La rubriko “Legu librojn” rememorigas, ke ĉi-jare ni travivos ankoraŭ unu feston: La Zamenhof-jaron, kaj rekomendas tri librojn por ekscii pli pri Ludoviko Zamenhof. Ankaŭ la rubriko “Interkultura Mondo” aliĝis al la



gratulantoj kaj bilancas sian agadon ne nur sur la paĝoj de *Juna Amiko*.

Frontpaĝojn de ĉiuj 150 numeroj de *Juna Amiko* vi trovos sur la kovriloj de la revuo. Eble tio inspiras vin serĉi la numerojn en pdf-formato en la retejo www.eventoj.hu/juna-amiko/, aŭ skribi al via redaktoro, ke li sendu al vi ĉiujn 150 numerojn de *Juna Amiko* en pdf-formato sur DVD-disko :-)! Sed ne nur pri la jubileo temos en tiu ĉi numero. La rubriko “LUME” ebligas al vi fari la mondon pli kolora, la rubriko “NATURE” prezentos al vi katojn en Armena montaro kaj simiojn el Sud-Ameriko, Azio kaj Afriko, amuzos vin rakonteto pri harpisto, “LASTE” parolos pri la Jaro de Zamenhof...

– Agrablan legadon, karaj junaj amikoj!
via redaktoro **Stano Marček**

Karaj legantoj!

Jen jubilea numero!
Jen la 150-a! Ĉiuj daŭraj kunlaborantoj kaj rubrikestroj de *Juna Amiko* traktas tiun jubileon en sia propra maniero. Mi deziras **danki** ilin.

Jes ja, sen ili nia revuo eble ekzistus, sed estus magra kaj sen riĉa enhavo. La skipo de *Juna Amiko* estas bunta: Elena venas el Ruslando, Malgosia el Pollando, Stefan el Nov-Zelando, Monika kaj Judit el Hungario, Luiza el Israelo, nia desegnisto Pavel el Ĉeĥio, nia redaktoro Stano el Slovakio. Jose el Kubo kutimas traduki bildstriojn por ni; certe vi ĝuas tiujn komiksojn. Jen la listo de regulaj



kontribuantoj. Plie tra la numeroj alvenas kontribuoj el aliaj mondopartoj: ni havas en JA 150 rakonton el Armenio,

ni havis prezenton el la nordo de Benino, ni havis kaj havos enigmojn el Japanio. Starigi kompletan liston ne eblas. Eble vi supozas, ke miaj kontribuoj venas el Svislando; foje jes, foje ne. Hodiaŭ mi sidas en Kotonuo, Benino, por skribi al vi! **Danko** iras ankaŭ al

nij tri atentemaj korektistoj: Ĉieko el Japanio, Karine el Armenio kaj Trezoro el Ĉinio.

La grupo de abonantoj nepre devas kreski. Helpu al ni kolekti novajn abonantojn!

Vivu *Juna Amiko*! Ek al 150 pliaj numeroj!
Mireille Grosjean
Prezidanto de ILEI



Jubilea bankedo

Help-materialo por ekzamenotoj. Rubrikestro: Judit Felszeghy.

I. Alveno

Oskaro (O), lia edzino Eleonora (E), iliaj gefiloj Maja (M) kaj Steĉjo (S), en hotelĉambro de Belurbo, por partopreni jubilean bankedon kaj feston okazigitan de la entrepreno de Oskaro, tuj post la okupo de la hotelĉambro (vidu la temon en JA 4/2016, Zorgoj pri vestaĵoj).

- M – Ho, kiel superba ĉambro! Banĉambro apude! Balkono!
- S – Ankaŭ televidilo estas! Ĉu ĝi funkcias? Kie troveblas la teleregilo?
- E – Maja, mi petas vin, ne saltadu sur ĉiuj litoj! Decidu, kiun vi elektas, kaj okupu nur ĝin, ne ĉifonigu la kovrolojn de ĉiuj kvar! Steĉjo, lasu la televidilon! Ne, ne necesas nun enŝalti ĝin! Ankaŭ la kurtenon ne tiradu! Kia belega panoramo videblas el la balkono! Steĉjo, ne grimpu sur la balustradon!
- M – Ĝi estas ja mia lito! Steĉjo, nee! Okupu la alian! Lasu mian lampon!
- S – Kiom da kanaloj estas de ĉi tie akcepteblaj? Panjo, ne staru antaŭ la televidilo! Kiam ni iros tagmanĝi? Mi estas terure malsata!
- E – Gefiloj, ne kriadu! Enpaku viajn aĵojn en la ŝrankojn kaj tirkestojn, kaj ni manĝos niajn sandviĉojn ĝis la vespermanĝo. Oskaro, kiam komenciĝas la bankedo?
- O – Kio? Ho, jes, la bankedo. Tuj mi rigardos la programon... eee, la biletoj, jen! Ne, tiu ĉi estas la skizo de mia parolado... la programo, jen: ekde la oka vespere!
- S – Panjo, donu la sandviĉon, ĉar mi mortos!

- M – Kia sandviĉo? Buterpano kun fromaĝo... dankon, ne. Mi ne estas manĝema. Prefere ni trinku kolaon en la restoracio!
- E. – Oskaro, ĉu vi venos en la bufedon? Ni samtempe ĉirkaŭrigardos en tiu eleganta hotelo!
- O – Elinjo, mi ankoraŭ deziras nepre tralegi mian paroladon! Pli bone, se mi nun laŭtleĝos ĝin, kaj vi ĉiuj atente aŭskultos kaj diros, se ion necesas ŝanĝi en ĝi!
- M – Sed Paĉjo, unue ni iru trinki!
- S – Unue ni iru naĝi! Sube estas ankaŭ baseno!
- E – Kiom longa estas via teksto? Ho, preskaŭ tri-paĝa! Ni unue...
- O – Unue vi aŭskultu la paroladon! Ĝi estas nur iom pli ol du-paĝa! Sidiĝu, kaj mi jam komencas ĝin!

II. Kiel verki festan paroladon?

Oskaro (O), lia edzino Eleonora (E), iliaj gefiloj Maja (M) kaj Steĉjo (S), en la hotelĉambro.

- O – Estimata ĝenerala direktoro, estimata vicdirektoro, estimata financa direktoro, estimata ĉefingĝeniero, estimata...
- M – Paĉjo, tio estas ege teda! Ĉu vi alparolos ĉiujn kolegojn ĉeestantajn unuope, unu post la alia?
- E – Laŭ mi sufiĉas diri nur "Estimata Estraro", ĉu ne?
- O – Bone, mi korektas tion. Do, aŭskultu plu!
- O – Mi estas dankema por la grandanima



gesto, ke mi kun mia malgranda familio havas la eblon partopreni tiun ĉi jubilean feston en bela loko. Mi tre ŝatas labori en tiu ĉi loko! Mi komencis labori en la entrepreno jam antaŭ dudek kvin jaroj, tiu ĉi estis mia unua laborloko, kiun mi elektis post la fino de la bazlernejo, ĉar mi ne emis tiam plu lerni, kvankam mi ne estis malbona lernanto. Sed mi ne ŝatis geografion kaj precipe ne lingvojn, ankaŭ mia instruistino pri la angla lingvo...

- S – Vidu, Paĉjo, kaj vi daŭre riproĉas min, kiam mi ne emas lerni!
- E – Vespere okazos ne gepatra kunveno, sed jubilea festo! Kial raportu pri la lernejoj aferoj tie?
- O – Ĉu vi opinias, ke mi forigu ankaŭ tiun parton?
- M – Anstataŭe rakontu, kial vi ŝatas labori tie, kiuj kolegoj helpis vin!

- S – Ankaŭ tion, kio ne plaĉas al vi, paĉjo, kaj kiujn kolegojn vi abomenas!
- O – Fileto, en tia publika festa vespero ne decas malfavore paroli pri kolegoj!
- E – Sed eblas mencii, kion vi atendas de la entrepreno kaj de la estraro! Ne nur pli altan salajron, sed perspektivon, bonan komunumon, agrablan laborejan etoson...
- O – Ho, se mi skribos kaj laŭtlege ĉion, kion vi proponas, dum la tuta bankeda vespero parolos nur mi!
- M – Ne forgesu mencii ankaŭ la eklaborintajn diplomitojn, la fratino de mia amikino plendis...
- S – Jes, kaj eblon por amuziĝi... Kaj sportumi!
- E – Sufiĉas, infanoj! Nun lasu labori vian patron, kaj ni dume trovu la bufedon!
- M – Paĉjo, ĉion ĉi vi rakontu kun pokalo da ĉampano en la mano!





III. Opinioj pri la festo kun konkludoj

Oskaro (O), lia edzino Eleonora (E), iliaj gefiloj Maja (M) kaj Steĉjo (S), en ilia personaŭto, survoje hejmen.

E – Estis mirindaj tiuj du tagoj! La ŝipekskurso estis la plej interesa, sed ankaŭ la promeno en la romantika Belurbo tre plaĉis al mi!

M – Kaj la hotelo! Ĝi estis vere luksa!

S – Pleje plaĉis al mi la basenoj kun varma akvo, kaj la ludiloj! Kaj la bongustaj manĝaĵoj kaj frandaĵoj! Precipe dum la jubilea festo!

E – Kiel pompa ceremonio ĝi estis! Kiom kostis tiu vespero, Oskaro? Oskaro!?

O – Kio? La vespero, ĉu? Mi ne scias.

M – Laŭ mi, la entrepreno elspezis multe! Kiom da sandviĉoj, salatoj estis!

S – Mi ŝategis ankaŭ la ĉokoladan kukon kun batita kremo!

M – Kaj la diversaj fruktoj! Kaj la trinkaĵoj!

E – Laŭ mi la jubilea bankedo kostis sufiĉe multe! Se ni kalkulas... Oskaro, kiom da kunlaborantoj ĉeestis? Oskaro?!

O – Mi ja stiras! Mi ne povas nun babiladi kun vi! Ho, ĉi tie eblas jam nur per 60-kilometra rapideco! Kion vi demandis?

E – Kiom da kunlaborantoj ĉeestis hieraŭ? Mi vidis, ke sufiĉe multaj...

O – Mi ne scias, kara... Kie eblas reiri al la aŭtoŝoseo?... Nun la maksimuma rapideco estas jam nur 40! Mi ne volas longe veturi laŭ tiu vojo, tra urbetoj kaj vilaĝoj...

S – La infanoj de mia aĝo estis 18, mi kalkulis ilin. Estis kelkaj tute malgrandaj ankoraŭ.

M – Mi ne kalkulis ilin, sed mi rigardis la vestaĵojn de la virinoj! Multaj surhavis longan robon, dekoltitan, kun brilantaj zekinoj.

S – Mi ŝatis ankaŭ la dancadon!

M – Jes, la dancistinoj prezentis tre





interesan, artan programon!

E – Ĉu vi aŭskultis la paroladon? Estis kortuŝe, kiam la ĝenerala direktoro rakontis la historion de la entrepreno kaj dankis la kolegojn por la kunlaboro. Li parolis vere bele!

M – Kial Paĉjo staris tute malantaŭe? Dum la tuta vespero mi atendis lian paroladon, kiun ni kune pripensis antaŭhieraaŭ!

E – Ĉar lia malnova jako ne jam estas butonebla... Kaj ankaŭ la pantalonon fariĝis malvasta por li.

S – Ankaŭ Paĉjo alparolis! Fine de la festa parolado li proponis trinki la ĉampanon por la entrepreno kaj la estraro.

M – Steĉjo, tion diris ankaŭ la aliaj!

E – Oskaro, kial ni veturas nun jam la duan fojon tra tiu ĉi ponto? Ĉu vi elektis la ĝustan direkton, kara?

O – Damne! Se vi daŭre babiladas, ne eblas atenti kaj pri la vojo, kaj pri la veturado! Nun mi devas trovi taŭgan lokon por turniĝi kaj veturi reen por retrovi la vojon!

Taskoj

I.

Legu (dufoje) la unuan dialogon laŭte, kaj ne rigardante la tekston, respondu la demandojn:

- Kiu interesiĝis pri la televidilo? Kiu saltadis sur la litoj? Kiu volis tuj manĝi? Kiu proponis manĝi sandviĉojn? Kiu volis trinki kolaon? Kiu tiradis la kurtenojn? Kiu grimpis sur la balustradon? Kiu volis iri naĝi? Kial volis Oskaro, ke la familianoj aŭskultu, kion li preparis?
- Legu dufoje, laŭte, la 2an parton kaj, sen rigardi la tekston, respondu la demandojn:
- Kiujn alparolis Oskaro komence de sia parolado? Pri kio volis rakonti Oskaro en sia parolado? Kion proponis al li la

familianoj rilate la festan paroladon?

- Vicigu, kio plaĉas kaj kio mankas, laŭ vi, ĉe via entrepreno; aŭ en la lerneja instanco, kiun vi vizitas!

- Legu (dufoje) laŭte la lastan dialogon, atentu pri la akcento, la tono, la intonacio.

- Klopodu imiti, kiel parolas la infanoj kaj la gepatroj! Vicigu, kiuj programeroj estis dum la jubilea festo, kion manĝis kaj trinkis la ĉeestantoj de la evento!

II.

- Imagu, ke vi estas unu el la gefiloj aŭ el la gepatroj, alvenintaj en la hotelon, kaj rakontu al via amik(in)o, kia estis la hotelo! Vi povas elekti formon de mallonga dialogo!

- Rakontu (sen rigardi la tekston), kio okazis dumvoje hejmen en la aŭtomobilo, pri kio la rolantoj babilis, kien, kiel ili veturis ktp!

- Preparu 6- ĝis 12-frazajn dialogojn kun via lernopartnero (vi povas ankaŭ noti la dialogojn):

- Estrarano de via entrepreno (via instruisto) petas vin prepari festan paroladon por la datreveno de la entrepreno (lernejo). (Atentu: preparu la dialogon pri peto/konsento, NE la paroladon en tiu tasko!)

- Du kolegoj (studentoj) babilas dum bankedo pri la favoraj kaj malfavoraj trajtoj de la entrepreno (lernejo).

- Kun viaj 1 – 3 kunlernantoj (klubanoj ktp) dialogu pri (imagita) festa vespero. Vi povas mencii, kiuj, kiom partoprenis, kiaj estis la paroladoj, kaj kia estis la programo, kion oni povis manĝi kaj trinki!

- Preparu 3- ĝis 5-frazan anoncon okaze de la 150a numero de nia revueto *Juna Amiko* (vi povas pripensi ankaŭ festeton tiukaze)!

III.

Skribu en 10 – 15 linioj pri la subaj temoj:
a) vi partoprenis en la 5a datreveno de via



Esperanto-klubo. Raportu en (reta) letero al via amik(in)o, kie kaj kiam disvolviĝis la festo, kiuj partoprenis, kio plaĉis aŭ malplaĉis al vi! Ne forgesu pri la formalaj postuloj de la letero!

b) Alvenis la tago de adiaŭo de viaj samklasanoj (universitataj studentoj). Preparu festan paroladon por la evento!

c) Via esperantista klubo festas sian 5-jaran datrevenon – preparu festan paroladon por la evento!

d) Preparu invitilon por infana maskobalo (same en 10-15 linioj)! Skribu, kial gravas, ke la infanoj partoprenu en diversaj maskoj, kaj kia estos la programo. Ne forgesu aldoni la datumojn (tago, loko)!

• Vi deziras okazigi jubilean feston

a) por viaj samklasanoj okaze de la datreveno de abiturienta ekzameno;

b) okaze de sukcesa lingvo-ekzameno;

c) okaze de diplomiĝo.

Mendu la necesan ejon (restoracio? hotelo? balhalego?), la diversajn servojn (muziko, priservo de tagmanĝo, bufedo ktp), kaj preparu ankaŭ la invitilojn!

Vortklarigoj

Superba: impone, spirhaltige bela.

Teleregilo: mane tenebla aparateto por regi aparaton (televidilon).

Balustrado: barilo aŭ apogilo ĉe la rando de teraso aŭ balkono.

Sandviĉo: manĝaĵo, du pantranĉaĵoj kun enmetita butero, ovo, ŝinko, fromaĝo...

Kolao: dolĉa, bruna senalkohola trinkaĵo kun kolao-nuksoj.

Teda: ĝena, malagrabla, troa.

Entrepreno: ekonomia unuo

de produktado, firmao, grava tasko.

Abomeni: malamegi pro naŭzaj aŭ malplaĉaj ecoj.

Komunumo: societo, kuniĝo, membraro aŭ administra distrikto.

Etoso: spirita atmosfero.

Diplomito: finstudinto kun diplomo.

Frandaĵo: delikata, alloga manĝaĵo, kiu donas plezuron.

Dekoltita: havanta eltranĉaĵon en vesto, por ne kovri la nukon, gorgon, ŝultrojn, aŭ parton de la brusto.

Zekino: ornamaĵo en formo de monero, alkudrita al virina vesto.

Trajto: linio de la vizaĝo, karaktera eco.





El mia kolora vivo

Verkinto kaj desegninto: Pavel Rak



Kolorigu la suban bildon laŭ la supra! Nomu la objektojn, bestojn kaj homojn! Kion ili faras? Kiajn vestojn portas la homoj? Kiajn kolorojn havas la objektoj, bestoj kaj vestoj? Kio okazas sur la bildoj? Ĉu ili estas egalaj?



Kolorigu la suban bildon laŭ la supra! Nomu la objektojn, bestojn kaj homojn! Kion ili faras? Kiajn vestojn portas la homoj? Kiajn kolorojn havas la objektoj, bestoj kaj vestoj? Kio okazas sur la bildo? Kiaj diferencoj estas inter la suba kaj supra bildoj?





Juna Amiko jubileas!

Nia internacia Esperanta revuo por lernejoj kaj komencantoj, eldonata de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj, jubileas: tiu ĉi numero estas jam la 150-a!

La revuon fondis en la jaro 1972 ĝia unua redaktoro Géza Kurucz, kiu estis la motoro en la ideo lanĉi tian revuon ene de la tiutempa Hungara Esperanto-Asocio, por plenumi evidentan bezonon por la multaj tiamaj lernantoj de Esperanto.

Li kun kelkaj aliaj instruistoj povis vidi la similspecajn revuojn je dispono por la lernantoj de aliaj lingvoj, kaj komprenis la valoron aperigi ion similan en Esperanto. Li konvinkis la ILEI- kaj HEA-estraranojn pri tio. Li redaktis la revuon regule de 1973 ĝis 1981, kiam li transdonis ĝin al Oldřich Kníchal, slovako vivanta en Hungario.

Kníchal redaktis ĝin ĝis la jaro 1986, kiam li transdonis la stafetan bastonon al alia eksterlandano, vivanta en Hungario, Stefan MacGill el Nov-Zelando. Kiam en 1996 tiu sentis kreskon de aliaj ILEI-taskoj, la revuo denove bezonis redaktoron. Géza precize en tiu jaro emeritiĝis el lernejstra posteno; li denove ĉefredaktis la revuon ĝis 2004 kaj de 2005 la duonon de la revuo, kiu tiam ricevis duoblan amplekson (52 paĝoj).

Komence de 2011 la 75-jara Géza Kurucz anoncis sian deziron retiriĝi. En 2013 Stefan MacGill fariĝis vic-prezidanto de



UEA kaj forlasis sian postenen de prezidanto de ILEI. Li anoncis sian deziron ĉesigi la redaktadon de *Juna Amiko*.

Sekvis lin en tiu ofico Stano Marček el Slovakio, membro de la Akademio de Esperanto. Stefan MacGill same kiel deko da aliaj personoj estas kunlaboranto de la revuo.




La regulaj kunlaborantoj kaj rubrikestroj estas Mireille Grosjean (prezidanto de ILEI), Judit Felszeghy, Stefan MacGill, Maĝosia Komarnicka, Mónika Molnár, Elena Nadikova, Samuel Béglise, Luiza Carol, Raita Pihälä. La lingvaj reviziantoj estas Karine Arakeljan, Trezoro Huang Yinbao kaj Doi Ĉieko, la administranto Sebastian Cyprich. (Laŭ Vikipedio)



Mireje Grosjean tranĉas la jubilean torton.



Kies gasto mi estas, ties feston mi festas



La rubrikon prizorgas **Mónika Molnár**

Ho, kiom rapide pasas la tempo! La granda vojaĝo de la Ulidoj estas jam nur tre fora aventuro, kaj ili pli kaj pli malofte parolas pri ĝi.



Ili retrovis siajn kutimajn okupiĝojn, la grandaj Ulidoj reiris en la lernejon, kaj iliaj kamaradoj ĝojis pro la revido. La tempo rapide pasas por ĉiuj, krom por Ulideto. Li ŝatus se la tempo flugus multe pli rapide. Li tiom ŝatus jam iri en la grandan

lernejon anstataŭ la infan-ĝardeno. Li tute malŝatas la komentojn de la pli aĝaj gefratoj:

- *Ĝoju, ke vi povas iri en la infan-ĝardenon! Vi vidis kiom vi ŝatus reiri, kiam en la lernejo vi havos ĉaron da hejmtaskoj!*

- *Tute ne!* - replikas tiam Ulideto.

- *Mi certe ŝatus ĉion en la lernejo, eĉ la hejmtaskojn!* - kaj liaj vangoj ruĝas pro la kolero. Nur sekrete li demandas foje sin mem: *"Ĉu vere en la lernejo mi ne plu povos ĝui tiom belajn rakontetojn, kiel ekzemple tiun ĉi de Nelia?"*




**Nelia Boni:
La malgranda
elefanto**

Vivis foje en Afriko malgranda elefanto. Iun belan, sunan tagon la malgranda elefanto renkontis leonon.

La leono diris: "Hmm, mi volas manĝi malgrandan elefanton!" Sed la eta elefanto diris: "Mi volas havi amikon! Ĉu vi volus esti mia amiko?"





La leono ne pensadis tro longe kaj diris: “Jes, mi volas esti via amiko!” “Ĉu vi volas veni en mian hejmon?” – demandis la malgranda elefanto. – “Do, venu, venu kun mi!”




La gepatroj de la eta elefanto ege miris kaj tuj demandis: “Kial vi prenas leonon en nian hejmon???” “Ĉar li estas mia amiko!” – respondis la malgranda elefanto.



Do, la leono dormis ĉe la elefantoj. Tute ne estis problemo. La sekvan tagon la gepatroj de la leono venis al la domo de la malgranda elefanto kaj frapis la pordon.



“Ni venis serĉi nian leonon. Ĉu li estas ĉe vi?” La patrino de la malgranda elefanto diris: “Ne, ambaŭ infanoj iris ludi en la ĝangalon.”



La patrino aldonis: “Kion ni faru? Ili ne plu povas separiĝi, tiom bonaj amikoj ili fariĝis.” “Ne gravas” – diris la leonoj – “nia eta leono povas resti ĉi tie kaj esti feliĉa.”

Ulideto tre ŝatis tiun ĉi rakonton, kiun la infangardenistino rakontis al la infanoj antaŭ kelkaj tagoj.

Li plupensis la aferon: “Se mi ne plu rajtos aŭskulti tiajn rakontojn en la lernejo, tiam... .. tiam eĉ pli bone!

Mi mem povos inventi novajn! Kial ne? Ankaŭ Nelia havas nur 8 jarojn. Se ŝi sukcesis, ankaŭ mi certe sukcesos. Ho, kiom mi ŝatus iri en la grandan lernejon!”



Ulideto tre ŝatas diskuti kun Ĝojulido. Li almenaŭ ĉiam ĝoje iras en la lernejon kaj eĉ pri la hejmtaskoj ne tro plendas. Por havi iom da konsolo, ankaŭ nun li petas Ĝojulidon, ke li rakontu iom pri sia tago en la lernejo.

– Hodiaŭ en la lernejo ni eĉ pli amuziĝis ol kutime – komencis sian rakonton Ĝojulido, kiu ĝojis rakonti sian tagon al la pli juna frato. – *Imagu, ni parolis pri granda festo kaj ni preparis belan bildon por ĝi!*

– Pri kiu festo temas? Mi tute ne scias. Kristnasko jam forpasis, Pasko estos nur en aprilo, mia naskiĝtago estos nur en somero... Kio do? Rakontu!

– Ĉu vi memoras? Mi jam foje rakontis al vi, ke en la klaso ni uzas belan, interesan revueton, kiu nomiĝas “Juna Amiko”. Do,



imagi, la nuna numero estas la 150-a numero!!! Neimageble! Ni provis imagi, kiom estas 150 numeroj kune, sed estis ne tre facile. Vidu nian komunan bildon sube, maldekstre. Ĉu vi vidas la tri ĉaretojn plenaj je “Junaj Amikoj”? Do, ni imagis tion iel tiel. Kaj se estas festo, certe ne povas manki la aer-balonoj, lumoj, koloroj. Ni pensis pri muziko, pri torto, eĉ pri paper-gruoj, kiuj pensigas nin al la paco. Mi tre ŝatas kunlabori kun miaj geamikoj en la lernejo. La festo estas pli bela, se ni povas dividi nian ĝojon kun la aliaj.

Vivu la 150-a Juna Amiko!

Dankon al la kunlaborantoj de la festa bildo, nome al Anne, Elise, Eloïse B, Eloïse M, Jon, Jonas, Lucas, Mattia, Nelia, Raphael, Stanley kaj Valérie.





Lida Elbakjan:

Blanka kavaliro de la lago Van

Laŭ legendo Dio benis la katon, kiu devis ekstermi muson kreitan de Diablo; tiu besteto provis elrodi la fundon de Noa-arkeo, por ke ĝi droniĝu.

La kato sukcesis fari tiun taskon, savis Noa-n kaj, kompreneble, savis la tutan homaron.

Faktoj montras, ke la unuaj hejmaj katoj aperis en teritorio de Armena Montaro, ĉe la lago Van. Tiujn katojn armenoj nomis "Vana Katu" (armene). Tiu speco de kato ne estas rezulto de selektado, ĝi estas tute natura, havas flavruĝkolorajn (aŭ abrikotkolorajn) voston kaj kapon.

La katoj Vana Katu havas armenan karakteron: amikemaj, saĝaj, tre viglaj. Vana Katu estas la plej granda speco de katoj: virkato pezas ĝis 10 kilogramojn, ina – ĝis 6. Ili perfekte naĝas fiŝkaptante, havas figuron, profilon de naĝisto: larĝan bruston kaj larĝe lokigitajn fingrojn kun membranoj inter ili. Ilia hararo posedas ekpuŝigan kapablon, pro tio ĝi tre rapide sekiĝas. Ili povas naĝi en akvo, kiam la aerotemperaturo havas -35 gradojn, kaj




nur finajetoj de haroj iomete glaciĝas.

Vana Katu estas perfektaj amikoj kontraŭ deprimado. Kaj krome, ekzistas opinio, ke valoras felinoterapio, tio estas kuracado per helpo de katoj. Ili bone sentas malsanan lokon ĉe homo kaj povas longe sidi sur tiu loko aŭ leki ĝin ĝis homo resaniĝas.

Inoj de Vana Katu estas tiom saĝaj, ke ili instruas siajn frujunajn idojn ĝuste manĝi, naĝi kaj uzi necesejon.

Oni diras, ke sufiĉas unufoje ekrigardi al la okuloj de Vana Katu, kaj vi ekvidos vian estontecon. Kaj, se hazarde vi eksonĝos pri kato kun diverskoloraj okuloj – sekvos feliĉo, ĉar ili amindumas kun anĝeloj.

La plej frua desegnaĵo de Vana Katu en okcidenteŭropa pentrarto estas portreto "Sinjorino kun kato" de pentristino Margaret Ĵerar (18-19 jc, supre).





Jose de J. Campos Pacheco

Simioj

Simioj estas bestoj, kiuj alvokas atenton de bestĝardenaj vizitantoj, ĉar ili kapablas fari akrobataĵojn, ili balancas sin, gratas sian nazon kaj etendas la manon, por ke la vizitantoj donacu dolĉaĵojn, kvankam tio ofte estas malpermesata.

Kiom da simiaj specoj ekzistas? Tiu demando estas malfacile respondebla, ĉar estas pli ol 500 specioj de simioj. Por studi ilin pli bone, oni dividis ilin en du grupojn: la simioj, kiuj vivas en Sud-Ameriko, kaj tiuj, kiuj vivas en Azio kaj Afriko.

La simioj vivas grimpante sur arboj, ili manĝas foliojn kaj fruktojn, kaj la ino havas unu idon en ĉiu nasko, kiun ĝi kunportas por mamnutri ĝin.

Oni trovas simiojn kun longa aŭ mallonga vosto, iuj eĉ ne havas voston. Simioj, kiuj vivas en Ameriko, volvas la voston kaj prenas per ĝi kvazaŭ per mano.

La homo en antikva epoko konsideris la simiojn siaj samspeculoj. En Egiptio troviĝas skulptaĵo de simio, ludanta harpon. La homsimioj estas konsiderataj la plej progresintaj bestoj de la mondo. Ili vivas en Afriko, Hindio kaj Indonezio. Inter ili troviĝas ĉimpanzoj, goriloj, orangutanoj kaj gibonoj.



Gorilo estas la plej granda senvosta simio. Virbesto povas kreski ĝis alteco de 1,68 metroj kaj pezi pli ol 270 kilogramojn. Kutime goriloj estas timemaj bestoj. Ili

vagadas en familiaj grupoj en ĝangaloj de tropika Afriko, precipe en Kongo. Ekzistas ankaŭ genro, kiu hejmas sur montoj.



Nokte la gorila familio dormas supre en la arbobranĉoj, sur plataĵoj konstruitaj el branĉoj kaj folioj. La virbesto dormas ĉe la tero kaj gardodeĵoras. Ĉefe ili manĝas vegetaĵojn, trunketojn kaj radikojn.



Orangutano vivas en

Borneo kaj Sumatro. Ĉi tiu ruĝbruna, vila simio, estas la dua laŭ grandeco kaj kutime loĝas en arboj, de kie ĝi malofte surteriĝas. Juna

orangutano post dresado povas esti plej milda dorlotbesto.



Ĉimpanzo sendube

estas la klaŭno de la besta mondo kaj ja amuzas homojn, kiuj vizitas cirkojn kaj zoologiajn ĝardenojn.

Ĉi tiu lerta kaj amikema besto rapide lernas kaj imitas, kaj kapablas efektiviĝi rimarkindajn artifikaĵojn kaj ludojn, kaj eĉ solvi problemojn. Iuj homoj asertas, ke ĝi estas la plej lerta el la bestoj. Sovagaĵ ĉimpanzoj vagadas kiel goriloj, nutrante sin per fruktoj kaj trunketoj, eĉ kaptante bestetojn kaj ŝtelante el birdonestoj.



La plej malgrandaj senvostaj simioj, **gibonoj**, estas elstaraj akrobatoj. Per helpo de siaj longaj brakoj kaj kruroj ili kapablas salti kaj svingiĝi tra arboj en maniero neebla

al homoj. Ili piediras multe pli facile ol la ceteraj senvostaj simioj kaj kapablas rapide kuri.

Kiam vi vizitos bestĝardenon, rigardu tiujn bestojn. Vi certe lernos novajn kuriozaĵojn pri iliaj vivoj.

Legu kaj ĝuu



Rubrikestro: Małgosia Komarnicka,
ul. Kilińskiego 14/3,
PL-59-300 Lubin,
Pollando, rete:
malgosia.
junaamiko@gmail.com



Gravaj konsiloj

Komenciĝas la nova jaro kaj do valoras ekkoni kelkajn gravajn konsilojn por ĝui legadon kaj emigi aliajn al legado. La legado aktivigas kvin gravajn kompetentojn; komunikadon, emocian inteligentecon, ripozon, koncentradon kaj emociojn.

Komunikado estas grava kompetento por socie funkcii. Legante ni disvolvas nian terminoprovizon, pliriĉigas nian lingvon kaj lernas kompreni parolmanieron de aliaj homoj.

Emocia inteligenteco estas necesa por normale psike funkcii. Memstara legado postulas fortostreĉon kaj persistecon por tralegi libron ĝis la fino. Tio instruas paciencon, sed ankaŭ kapablecon realigi celon montrante, ke ne ĉion ni povas atingi rapide.

Ripozo estas bezonata precipe post longa spektado de filmoj kaj komputila ludado. Legado estas la plej bona rimedo de ripozo, kiu permesas kvietiĝi kaj fari vojaĝon al la mondo de imagoj.

Koncentriĝo estas malfacila tasko, sed necesa por normale intelekte evolui. Ĝia manko kaŭzas maltrankvilecon, troan agiteblon kaj mankon de memfido, kaj malfacilecon por venki problemojn. Legado postulas tian aktivecon, kiu plilongigas tempon de koncentriĝo.

Emocioj permesas travivi enhavon de libroj. Legado de libroj elvokas sentemon kaj kunsentemon. Tial ofte legado de ĝustaj libroj fariĝas kuraciterapia formo.

Ni ĉiam memoru neniam trakti legadon de libroj kiel punon. Neniu ŝatas ion, kion li aŭ ŝi devas fari kiel punon. Legado estas ja bonega ludo.

Klubo de bona libro

La Biblioteko de *Juna Amiko* por junuloj kaj infanoj kreskas dank' al viaj proponoj. Bonvolu sendi viajn proponojn de libroj, kiuj montras pozitivajn valorojn (ekz. toleremon, amikecon, apogon al malpli fortaj homoj), helpas kompreni vin mem kaj aliajn kaj ebligas adaptiĝi al nia iom malgaja realeco. La proponojn kun la titolo, aŭtoro kaj mallonga rekomendo, sendu al la supra adreso, aldonante la noton: Biblioteko de *Juna Amiko*.

Rekomendo

Por la Biblioteko de *Juna Amiko* mi ĉi-foje rekomendas pli ol unu libron. Dum la Zamenhof-jaro bonvolu tralegi kiel eble plej multe librojn pri Ludoviko Zamenhof kaj Esperanto. La librojn vi trovos en bibliotekoj, librovendejoj kaj en Esperanto-organizaĵoj. Elektu librojn ĝustajn por via aĝo.

Mi mallonge rekomendos tri librojn, kiuj estis eldonitaj en Pollando, la naskiĝlando de Ludoviko Zamenhof.



Knabo sub verda stelo (*Chłopiec spod zielonej gwiazdy*) de Maria Ziolkowska. La libron mi rekomendis antaŭ du jaroj, sed mi denove rememorigas ĝin al vi, ĉar la aŭtorino priskribas en ĝi kvardek jarojn de la vivo de la kreinto de la internacia lingvo.

Ŝi komencas en la jaro 1865 kaj finas en la jaro 1905, interese montrante la medion, en kiu estis edukita juna Zamenhof. Sur la paĝoj de la libro ni ankaŭ trovos ampleksan bildon de ĉiutaga vivo de tiutempa Varsovio. La verko finiĝas per epilogo, kiu estas admiro pri Ludoviko Zamenhof.





Ĉio komenciĝis ĉe la verda (*Wszystko zaczęło się na Zielonej*) de Tomasz Wiśniewski kaj Zbigniew Romaniuk. La libro estis eldonita dulingve, en la pola kaj Esperante. Legante ĝin vi ekscios pri la vivo de Ludoviko Zamenhof, lia familio, komenco

de Esperanto kaj ankaŭ pri multkultura Bjalistoko kaj pri aliaj lokoj, ligitaj kun la kreinto de la internacia lingvo. En la libro vi trovos multajn fotojn, ĝis nun ne publikigitajn.



Doktor Esperanto - komikso pri Ludoviko Zamenhof de Wojciech Łowicki. La libro estas escepta, ĉar ĝi estis eldonita komiksforme kun belaj desegnaĵoj de Daniel Baum. Legante la libron vi ekkonos la plej gravajn faktojn el la vivo de Ludoviko Zamenhof

kaj informojn, ligitajn kun la historia periodo, en kiu ekestis kaj disvolviĝis Esperanto.





Ekkonu mian landon pere de ĝiaj legendoj

Konkurso ne nur por junaj legantoj



Ĉi tiu 150a numero de *Juna Amiko* estas la unua numero ĉi-jare, kaj ĉi tiu jaro estas escepta jaro.

La jaro 2017 estas interalie la Jaro de la centa datreveno de la morto de Ludoviko Zamenhof. Tiun gravan decidon UEA faris por nia Movado. Plie Unesko dum sia 38-a Ĝenerala Konferenco en novembro 2015 decidis honori pli ol 50 personecojn kaj eventojn dum 2017 kaj inter ili aperas nia Majstro. Tial la Zamenhof-Jaro okazas sub la patroneco de Unesko. Por ĉiu esperantisto grava estas certa mistera lando, kie renkontiĝas homoj de diversaj naciecoj kaj kunigas ilin komuna lingvo. Tiu lando nomiĝas Esperantio (Esperantujo, Esperantolando). Imagu kia bela estas tiu lando, legante la versaĵon *Verda Fabelo* de Halina Kuropatnicka-Salamon, polino, vroclava poetino kaj esperantistino.

Verda fabelo

*Ĉirkaŭigita per florrubando
estas proksime Esperantlando;
– rimarku Ĝin.*

*Tie anĝeloj verdeflugilaj
vekas kun birdoj tagojn trankvilajn
kaj vokas nin.*

*Inter branĉaro allogaj kantoj,
kaj ĉiu sonas en Esperanto,
por vi, por mi.*

*Sufiĉas iri, sufiĉas veni,
favoran sorton dankeme preni
– ĉu volas vi?*

*Nur tenu forte mian manplaton,
ne silentigu propran korbatojn
– jen nia voj'.*

*Necesas revii, necesas miri,
iom rideti, arde deziri
fabelos ĝoj'.*



Tiun belan misteran landon kreis Ludoviko Zamenhof, donacante al ni Esperanton, kaj do mi proponas tralegi sekvan poezion de Halina Kuropatnicka-Salamon *Preĝo de Anĝelo*. Ĉi-okaze, ĉu vi imagas, ke iam ekzistis mondo sen Esperanto?

Preĝo de anĝelo

*Homoj, teraj gefratoj,
aŭskultu mian vokon:
sendu disfloran ĝojon
al tiu ĉielloko,
kie en maltrankvilo
daŭras mia amiko,
plena de atendo,
doktoro Ludoviko.
Certigu lin finfine,
ke vivis li nevene;
ke frazojn verde-vortajn
jam uzas eĉ infanoj.
Vespere avoj flustras
al nepoj, ridetante:
Imagu, iam oni
ne konis Esperanton.*



La konkursa tasko estas jena: bonvolu prepari bildojn laŭ la vortoj de la poetino. Valorajn premiojn fondis la Eŭropa Centro de Interkultura Edukado.

La konkursan taskon bonvolu sendi kun viaj nomo, adreso kaj indiko "Konkurso – legendo" ĝis la 31a de marto 2017 al la adreso de Europejskie Centrum Edukacji Międzykulturowej, ulica (strato) Pl. Orłąt Lwowskich 5/1, PL 53-605 Wrocław, Polska/Pollando.



Malou Scheidegger:

Rakonteto por harpisto

Iam estis... Jes, iam, antaŭ longa tempo, kiel en la feinaj rakontoj.... Ne! Ne! Tio okazis antaŭ proksimume kvin jaroj, se mi bone memoras.

La etfingro de la maldekstra mano de arda kaj talenta violonisto decidis ne plu funkcii, ne plu ludi.

“Sufiĉas por mi, mi ne plu volas labori!”

La aliaj fingroj de la maldekstra mano petis, petadis...

“Ne lasu nin solaj, ni ne povas bone labori sen vi! Mankas notoj en ĉiuj melodioj. Ĉio fariĝas muzikaĉo sen vi! Bonvolu! Bonvolu kunlabori!”



Itala muzika virtouzo
Niccolò Paganini



“Aĥ” – diris la etfingro. “Finfine la aliaj agnoskas mian valoron!” La etfingro estis tute feliĉa, sed obstine ĝi ne volis ion aŭdi, ĝi ne volis plu kunlabori.

“Rigardu... nun ni estas tute malsekaj pro la larmoj de la violonisto, kiu ne plu povas ludi. Ĉu vi ne havas koron?” – diris la kvar aliaj fingroj de la korflanka mano.

Tamen tiaj krioj kaj larmoj ne efikis. La etfingro ne modifis sian rifuzeman sintenon.

“Esperino”, kiu estas de la familio de Meluzino kaj de la feino Sonorileto, kaj kiu same havas magiajn povojn, promendis tie tute neatendite, laŭ feliĉa hazardo (tamen kio estas fakte hazardo...?). Ŝi aŭdis ĉion de tiu diskuto – disputo inter la klubo de la kvar fingroj kaj la etfingro. Kion fari?

Eŭreka! Mi trovis! Esperino ĉiam havas en sia dorsosako semojn de bonaj ideoj. Ŝi metis kelkajn en la kapon de la violonisto.

Kara leganto! Ne forgesu, ke tio, kio aspektas al ni, simplaj homoj, komplete freneza kaj ne realisma, ĉiam eblas al feinoj ĝenerale kaj al Esperino pli precize.

Ŝi metis en la kapon de la violonisto etajn ĝermojn de novaj ideoj. Ŝi povis, danke al la modernaj feinaj teknikoj, ĵus akiritaj okaze de progresiga kurso, deviga por ĉiuj feinoj cele al konservado de ilia laborpermeso. Ŝi ankaŭ instalas programon por helpi al la ĝermoj ĝermi en la kapo de la violonisto. Ŝi uzis naturan sterkon; ŝi uzis de tempo al tempo fekundigilon de la fama marko “Per-sistem-o”, por eviti sekiĝon de la semetoj kaj kuraĝigi ilin en ilia pozitiva evoluo.





La tristega violonisto iom post iom flaris subtilan parfumon de espero, kiu tiklis liajn nazotruojn, eniris kaj invadis lian tutan korpon. Etaj la ideoj estis, tamen ili estis nun multe pli grandaj kaj fortaj, kaj la vorto “Harpo” komencis montriĝi kaj ne volis plu malaperi.

“Kompreneble mi povus eble ludi harpon; por fari tion, oni ne bezonas etfingron. Tamen ĉu en mia aĝo mi kapablos lerni ludi harpon?”

“Al kiu mi demandu pri tiu nova studado? Klare mi iru al mia amikino harpistino!”

Kaj nun imagu, ke nia violonisto havas tian frenezan ideon, iras kolekti informojn pri siaj kapabloj kaj ŝancoj fariĝi “Harpisto”!

Lia amikino ne malkonsilis al li komenci tiun studadon. Ŝi klarigis pri la diversaj harpotipoj kaj montris la instrumenton, kiu plej taŭgos por li. Tamen tio, kion li plej multe bezonis, estas tempo, ĉar neniu povas majstri rapide tian instrumenton.

Esperino observis en atendo kaj kun atento. De tempo al tempo ŝi aldonis iom da fekundigilo “Per-sistem-o”

Kaj nun? Certe vi volas pli scii pri tio, kio estas hodiaŭ.

Mi iris aŭskulti la “Harpiston” ĉe amikino. Malmultaj homoj scias, ke mia amikino estas la filino de Avo Frosto, tamen silentu! Temas pri sekreto!

La koncerto estas mirinde bela kaj



La amikino harpistino

El la violonisto
nun estas
– “Harpisto”

aŭdiĝas melodioj kaj baladoj, kiuj tiras nin for de la streĉo de la nuntempa epoko.

Ĉu mi rajtas sugestii:

Instaliĝu komferte, fermu la okulojn kaj vi aŭdos la tintantan ridon de “Esperino”. Se vi sukcesas fermi ankoraŭ pli forte la okulojn, vi vidos ŝin danci sur la lumradioj.

Kaj “Etfingro”? Jen por ĝi estas plena feliĉo! Ĝi estas kuntirita, nerezisteble, en la danco de la kvar fingroj sur la harpaj kordoj. Ĝi tre ŝatas tion, tamen ĝi silentas pri tio.

La kvar fingroj diligente kaj feliĉege fariĝis spertuloj kaj ludadas arde por kantigi kaj la harpon kaj la “Harpiston”!

Edifa konkludo

Ĉu nepras tia inspira fina frazo?

Ĉar mi ne estas la fama franca fabelisto Jean de la Fontaine, mi ne volas trudi mian ideon.

Tamen mi ŝatus diri al vi tion, kion vekas tiu historieto en mia koro.

La rakonto de “Etfingro” diras al mi jenon: En malfacilaj momentoj de la vivo, kiam oni suferas profunde en sia homa animo, tiam povas vige ŝpruci la forto de la vivo.

Kaj nun, se vi volas, trovu mem vian inspiran konkludon.

Malou Scheidegger verkis tiun historieton laŭ vera travivaĵo de violonisto, kiu subite ne plu povis uzi sian etfingron. (Tradukis Mirejo Grosjean)



Vortbeleco en Esperanto – jam la dua

En Vroclavo, de la 2-a ĝis la 4-a de decembro, okazis jam la dua “Vortbeleco en Esperanto”, kiu ĉi-foje daŭris tri tagojn kaj konsistis el tri partoj, el la Festivalo de Deklamata Poezio, la Konkurso de Laŭta Legado kaj vizitado de Vroclavo.

La evento denove estis preparita de la Eŭropa Centro de Interkultura Edukado* (ECEM), kune kun neesperantista organizaĵo “Horizonto”. La patronoj estis la Marŝalo de Malsupra Silezia Vojevodio kaj Pola Sekcio de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj.

“Vortbeleco en Esperanto” estis destinita por infanoj, gejunuloj, plenkreskuloj kaj pliaĝuloj. La programon lerte gvidis Halina Kuropatnicka-Salamon (la vicprezidantino de ECEM) kaj prezentadon de poeziaĵo kaj prozaĵo prijuĝis profesia kaj internacia ĵurio, Wera Blanke el Germanio, Istvan Kabok el Hungario kaj Małgosia Komarnicka kaj Andrzej Kraszewski el Pollando. En la pritakso estis konsiderataj: lingva korekteco, parolmaniero, originaleco, elekto de ĝustaj kaj estetikaj valoroj. La premioj estis aljuĝitaj laŭ aĝkategorioj.

La 2an de decembro, vendredon, okazis la Festivalo de Deklamata Poezio, dum kiu ĉiu partoprenanto prezentis unu poeziaĵon en Esperanto, dum la nesuperebla tempo de tri minutoj. La unuajn premiojn gajnis: Michalina Gnacek (ĝis la aĝo 18 jaroj), Wojciech Ławnikowicz (de 18 ĝis 54 jaroj) kaj Monika Radomska (je la aĝo super 55 jaroj).

La 3an de decembro, sabate, okazis la Konkurso de Laŭta Legado, dum kiu ĉiu partoprenanto legis de si elektitan tekston





en Esperanto, dum la nesuperebla tempo de kvar minutoj. La unuajn premiojn gajnis: Maja Gumienna (ĝis la aĝo 18 jaroj), Magdalena Piętka (de 18 ĝis 54 jaroj) kaj Lidia Fit (je la aĝo super 55 jaroj).

La 4an de decembro, dimanĉe, la organizantoj, gastoj kaj partoprenantoj matene ĉeestis en la sankta meso, kiun celebris la pastro prelato Stanisław Pawlaczek, en la preĝejo de Sankta Marteno (unu el la plej malnovaj preĝejoj de Vroclavo). Poste, gvidataj de vroclava ĉiĉeronino, ĉiuj admiris la konstruaĵon Hala Stulecia (la Halo de la Jarcento), kiu en la jaro 2006 estis enskribita en la liston de Mondaj Kulturaj Heredaĵoj de Unesko. Grava punkto de la ekskurso estis ankaŭ vizitado de la nova parto de vroclava ZOO – Afrykarium. Ĝi estas komplekso (la unua kaj sola en Pollando), kiu prezentas akvan kaj kontinentan ekologiajn sistemojn de la afrika faŭno.


La festivalon akompanis escepte familia etoso. Ĉiutage dum la paŭzo ĉiuj estis invitataj je bongustaj kukoj, dolĉaĵoj, kafo, teo kaj trinkaĵoj, kaj dimanĉe ankaŭ estis regalitaj per tagmanĝo.

Ĉiun konkursan tagon finis arta programo. Vendrede okazis la koncerto de vroclavaj muzikistoj kaj kantistoj, Armand Perykietko, Wojciech Ławnikowicz kaj Radosław Tokarż, kun muzikteamo. Sabate aplaŭdon elvokis poezie-pentroarta programo, en kiu Halina Kuropatnicka-Salamon deklamis sian poezion kaj Małgorzata Szałek kune kun sia malgranda fileto pentris bildojn al la deklamata poeziaĵo. Ĉiuj bildoj estis disdonitaj al la publiko. La dutagan konkurson finis koncerto de Leszek Kopec.


Ni jam invitas ĉiujn por partopreni en la sekva, la tria “Vortbeleco en Esperanto”.

Ni ankaŭ tre kore invitas vin maje al Vroclavo, kie la 18-22-an de majo 2017 okazos la Dua Interkultura Majrendevuo. Ĝia programo estos tre riĉa kaj konsistos el la Internacia Simpozio, el la Kvina Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj kaj el multaj interesaj laborsesioj, artaj programoj kaj prelegoj, kaj ekspozicioj pri Esperanto.

Je la nomo de la organizantoj
Małgosia Komarnicka
la prezidantino de
Eŭropa Centro de Interkultura Edukado



**Eŭropa Festivalo
de Esperantaj Kantoj**
Europejski Festiwal Piosenki Esperanckiej



**Europejskie
Centrum
Edukacji
Międzynarodowej**

EŬROPA CENTRO DE INTERKULTURA EDUKADO
kaj
KLUBO de MUZIKO KAJ LITERATURO
invitas vin partopreni en la

KVINA EŬROPA FESTIVALO DE ESPERANTAJ KANTOJ
kiu okazos en **VROCLAVO** (Pollando)
la **20-21an de majo 2017**

La festivalo okazas ĉiujare en majo en du kategorioj:

1. koruso aŭ ensemblo,
2. solisto.

Aĝo de la partoprenantoj: de 6 ĝis ... jaroj.
Ĉiu partoprenanto kantas du kantojn: unu en Esperanto, la alian en sia nacia aŭ fremda lingvo.
Pritaksataj estas nur esperantaj kantoj.

Aliĝu al la ĉi-jara **Internacia Festivalo,**
sub patronadoj de

MILA VAN DER HORST KOLIŜSKA,
konata esperantistino, honora membro de UEA kaj ILEI
kaj

EUROKKA
fakasocio de TEJO kaj muzika faka asocio de UEA; kreinto de la eldonejo Vinlikosmo

La 20an de majo – konkursa provaĵo de partoprenantoj
La 21an de majo – Koncerto de Premitoj

Ĉiuj informoj estas riceveblaj ĉe la adreso:
festivalo.eo@gmail.com skribante en la temo de la mesaĝo: E-kanto.

ATENDAS VIN VALORAJ PREMIOJ!

Sendu vian aliĝilon ĝis la fino de la **aprilo 2017**

Nome de la organizantoj:
Małgorzata Komarnicka – Ĝenerala Direktoro de la Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj
Jean-Marc Leclercq – Arta Direktoro de la Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj

La sorĉa kanto-mondo

La rubrikon preparas Małgosia Komarnicka,

ul. Kilińskiego 14/3, PL-59-300 Lubin, malgosia.junaamiko@gmail.com



**Kanto akompanas nin ĉie...
Ni volonte aŭskultas ĝin, ĉar ĝi
helpas vidi kaj krei alimaniere
la mondon, ebligas revii aŭ
transdoni niajn sentojn.**

Ĝi ankaŭ helpas akiri pli bonajn rezultojn dum lernado, ĉar lernantoj, ludante, samtempe lernas, kreskigas sian emocian engaĝiĝon en la lerno-procezo. Sufiĉas nur ekkantante, kaj ili tuj rememorigas kanto-vortojn. Tiumaniere la lernantoj plej bone kaj sugeste alproprigas al si la materialon

de la leciono, ofte ne konsciante, ke ili ekzercas sin en fremda lingvo.

La laboro kun kanto havigas ĝojon kaj kontenton al la lernantoj; do ni ne malhelpu ĉi tiun agrablecon de kantado dum la Esperanto-lecionoj.

Mi proponas kune kanti la kanton "Bonan Matenon, Bela Mond'!" La vortojn kaj muzikon en la 80aj jaroj kreis Charlotte Kohrs, la fondintino kaj longdaŭra direktorino de INFANOJ ĈIRKAŬ LA MONDO. La kanton por la legantoj de *Juna Amiko* elektis nia longdaŭra kunlaboranto Jose de J. Campos Pacheco.

Bonan matenon, bela mond'!



*Hodiaŭ brilas la suno.
kaj ho mi estas feliĉa!
Mi kantas al la mondo,
"Bonan matenon,
bela mond'!"*

*Hieraŭ pluvis la pluvo.
Sed ho mi estis feliĉa!
Mi kantis al la mondo,
"Bonan vesperon,
pluva mond'!"*

*Morgaŭ fulmotondros.
Sed ho mi estos feliĉa!
Mi kantas al la mondo,
"Bonan nokton,
brua mond'!
Bonan nokton,
mirinda mond'!"*

I. HO - DI - AŬ BRI - LAS LA SU - NO, KAJ HO MI ES - TAS FE - LI - ĈA! MI
 II. MI - Z - KANU PLU - VIS LA PLU - VO, SED HO MI ES - TIS FE - LI - ĈA! MI
 I. KAN - TAS AL LA MON - DO, "HO - NAN MA - TE - NON, BE - LA MOND'!"
 II. KAN - TIS AL LA MON - DO, "HO - NAN VES - PER - ON, PLU - VA MOND'!"
 III. MOR - GAŬ FUL - NO TON - DROS, SED HO MI ES - TUS FE - LI - ĈA! MI
 KAN - TUS AL LA MON - DO, "HO - NAN NOK - TON, BRU - A MOND'!"

Bonvolu respondi jenajn demandojn:

- Kion vi faras dum suna tago?
- Ĉu vi promenas aŭ ludas kun viaj geamikoj?
- Kion vi faras kiam pluvas? Ĉu vi restas hejme? Kial? Kion vi tiam faras?
- Kion vi faros se morgaŭ fulmotondros?

Viajn respondojn **sendu** al mi por ricevi valorajn premiojn, kiujn fondis pola organizaĵo Eŭropa Centro de Interkultura Edukado. **Kolorigu** ankaŭ la desegnaĵojn, kiujn por *Juna Amiko* speciale preparis niaj brazilaj legantoj, la 10-jara Joyce Adviento kaj la 12-jara Sheree Sarandi.





Rubrikestro:
Elena Nadikova,
Esperanto-klubo "Betuleto"
Lernejo/Ŝkola 56,
pr. Traktorostroitelej, 38
RU-428028 Ĉeboksari, Rusio
lenu_esperto@mail.ru



Interkultura Mondo gratulas!

Saluton, karaj legantoj!

Jam estas la jaro 2017 kaj Interkultura Mondo tutanime gratulas vin okaze de la nova jaro! Ĝi estu plena je diversaj agrablaj eventoj en via vivo, forta sano, signifaj sukcesoj kaj novaj amikoj!

Ni esperas, ke nia amikeco daŭros kaj interkultura kunlaboro prosperos danke al nia internacia lingvo! Ĉi-foje vi tenas en viaj manoj specialan, jubilean numeron de *Juna amiko*. Ĝi estas jam la 150-a. Dediĉe al tio ni decidis iom superrigardi nian interkulturan mondon tra la jaroj, kaj fari kelkajn resumojn.



Do, la rubriko Interkultura Mondo aperis en la jaro 2005. Ĝi "naskiĝis" danke al la projekto Interkulturo de ILEI – Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj. La projekto estis lanĉita en 1998 dum la Universala Kongreso de Esperanto en Francio. Ĝi celis interkulturan edukadon de homoj pere de Esperanto. Multaj homoj komunikis inter si en kadre de la projekto pere de nia lingvo. En 2000 en la projekto partoprenis 97 lernejoj el 25 landoj de ĉiuj kontinentoj.

Dum sia 12-jara ekzisto Interkultura Mondo prezentis la samnoman projekton diversflanke. La rubriko rakontis pri 8 Esperanto-kluboj tra la mondo – partoprenantoj de la projekto kaj ne nur: "Betuleto" el Rusio, urbo Ĉeboksary; "Verda junularo" el Ukrainio, urbo Lucjk; SEA – Sai Esperanto-Akademio, klubo "Sai Saranath" el Hindio, urbo Bangaloro; la grupo de la lernejo Ping Rong el suda Tajvano, urbo Ping Tungo; la klubo "Verdaj steletoj" el Bulgario, urbo Polski Trambeŝ, la grupo el la bazlernejo "Komlóstetöi" (Komloostetei) el Hungario, urbo Miskolc; la klubo "Verdaj papilietoj" el Pollando, urbo Gubin kaj la grupo el mezgrada lernejo el Ayahohoue, Benino.

La partoprenintoj de la projekto iom prezentis literaturojn de siaj landoj. La legantoj de *Juna Amiko* ĝuis belegan popolan hindan fabelon: "Patrino kaj filo", rememoris la plej konatan knabinon en la mondo – Pipi Ŝtrumpolonga el Svedio.



Interkultura Mondo rakontis pri realigo de gravaj internaciaj projektoj pri interkultura edukado: AKEL – Alternativa Komunikado inter Eŭropaj Lernejoj, “Gvidlibro de la amikeco”, “Diversaj karier-vojoj”, “La diversaj profesioj”. Tiuj valoraj peresperantaj projektoj realiĝis enkadre de diversaj edukaj kaj kulturaj programoj de Eŭropa Unio: “Socrates/ Comenius 1 – inter lernejoj”, “Lernado (Edukado) dum la tuta vivo”.

Enkadre de tiuj projektoj okazis kelkaj interesaj agadoj. La partoprenantoj faris esplorojn pri diversaj aspektoj de la vivo kaj kulturo de siaj landoj, kaj prezentis siajn rezultojn antaŭ siaj partneroj laŭ la projekto.

Okazis kelkaj internaciaj renkontiĝoj de la partoprenantoj. La kunvenoj pasis laŭvice en la lernejoj-partneroj. Interkultura Mondo rakontis pri kelkaj tiuj renkontiĝoj – en Italio en 2006, en Bulgario en 2008 kaj 2012, en Francio en 2011.

Multaj fotoj ebligis al la legantoj imagi la etoson de tiuj internaciaj kaj interkulturaj lernejoj kunvenoj. Ja partoprenantoj ĉiam estis el diversaj landoj, kvankam ĉiuj el Eŭropa Unio. Do, ni povas dume nur revii, kiam okazos similaj lernejoj projektoj mondscale. Revi... kaj agi, ĉu? Ja ĉio dependas de ni mem. Ni havas bonan unikan rimedon por tiuj celoj – nian internacian lingvon. Ĉio

Islando: malgranda lando kun grandaj mirakloj

Saluton, karaj legantoj!

Se mi demandas vin: “Kia Esperanto-evento estas la plej grava en la jaro?” Vi, certe, respondos: “Universala Kongreso”.

Je, UK estas la ĉefa aranĝo en Esperantujo. Ĝi okazas ĉiujare en diversaj landoj. Pasintjare estis la 98-a kongreso. Ĝi okazis en Islando, en la ĉefurbo Rejkjaviko, la 20-27-an de julio 2013. La temo de la kongreso estis “Insuloj sen izoliĝo: por pli justa komunikado inter lingvo-komunumoj”.

Ĝin partoprenis 1034 homoj el 55 landoj. Kiel ĉiam, la programo de la kongreso tro abundis. La partoprenantoj havis okazon viziti diversajn prelegojn – laŭ siaj intereso, komisiojn de diversaj celgrupoj, variativajn lecionojn kaj paroligajn kursojn pri Esperanto. Kongresanoj bone guis multajn koncertojn, interesajn konkursojn,



testrajtojn, kune kantis en Internaci Koruso, okazis en diversaj medioj. La programo oni kompilis tiel, ke ĉiu povis trovi por si multon gravan kaj interesan. Tuj grupoj kaj fakoj ene de Esperantujo estis prezentitaj en Rejkjaviko. Post seriozaj programoj la kongresanoj povis rigordi dum popoladecado aŭ filmspektado. Kaj danke al bonega organizado, mi certas, ĉiuj kongresanoj revenis hejmen kun bonaj impresoj kaj la plej varmaj rememoroj pri Islando.

Multe kontribuis al tio unikeco de Islando mem. Eblas diri, ke UK allogis atenton ne nur al Esperanto – sed ankaŭ al la insulo. Islandon plejparte okupas nomi fabelaj, ĉarmanta lando. Kie ankoraŭ vi povas observi realajn lumajn pejzaĝojn? Aŭ somere promeni sur glaciomonto? Tia ĉi malgranda lando estas plena je grandaj neŝorgeblaj mirakloj. Ĉu, ĉi ti estas seĉordinara. Ni raj



alia naskiĝos el niaj energio kaj kredo.

Ne povis Interkultura Mondo preterpasi grandiozan iniciaton de esperantistoj kiel Lingva Festivalo. La aranĝo naskiĝis danke al la elstara usona esperantisto Dennis Keef. En unu el siaj numeroj *Juna amiko* prezentis Lingvan Festivalon, kiu estis organizita de la Esperanto-kluboj en Ĉuvaŝio – unu el naciaj respublikoj de Ruslando.

Tamen ne nur lingvaj festivaloj famigis Esperantujon. Multajn noblajn, allogajn iniciatojn scias realigi nia movado. En 2008 esperantistoj instalas subakvan Esperanto-aleon en la fundo de Nigra Maro kun la busto de Zamenhof. Ekde 2001 ĉiujare niaj samideanoj organizas la internacian ekspozicion, dediĉitan al la Internacia Virina Tago en Japanio, ekde 2011 – la Mondan Pupekspozicion same en la lando de la leviĝanta suno.

Ofte rakontis Interkultura Mondo pri variaspecaj Esperanto-aranĝoj tra la tuta mondo. Ja sperti interkulturecon de nia movado kaj de Terglobo ĝenerale ne eblas fari tiom plene, kiel dum internaciaj renkontiĝoj. Ilin partoprenas centoj kaj eĉ miloj da esperantistoj el diversaj landoj kaj mondopartoj. Ili estas diversaĝaj, havas nesamkoloran haŭton, parolas hejme



Kvara renkontiĝo de gelnartoj el Bulgario, Francio, Pollando kaj Hungario en dujara Comenius-projekto.

Tiszafüred, Hungario
10-17 oktobro 2010



malsimilajn lingvojn. Tamen ili sentas sin inter amikoj, eĉ se ĉirkaŭe troviĝas persone nekonataj homoj. Ĉiuj estas samideanoj kaj apartenas al Esperantujo – unika medio kun propraj reguloj, kompreneblaj por ĉiuj tradicioj. Kaj la ĉefa estas – estimo al ĉiuj homoj. Jen estas vera kulturo inter la homoj, la interkulturo. La lokoj de diversaj Esperanto-aranĝoj tre faciligas lernadon de la monda geografio. Kiel sciante, Unesko anoncis 2017 jaron de turismo. Do, Esperanto-turismo same kontribuas al interkultura edukado de homoj. Ekde 2005 nia rubriko “vojaĝis” al Internaciaj Infanaj kongresetoj – al Polando (la patrolando de Zamenhof) en 2009; al Kubo en 2010 kaj al Danio en 2011; al la kongreso de Eŭropa Esperanto-Unio (EEU) al Irlando en 2012. Al la Universala kongreso en Islando en 2013; al la ILEI-konferenco en Hungario en 2016; al du Internaciaj Junularaj Kongresoj: en Israelo en 2013 kaj en Germanio en 2015. Ĉiuj plej signifaj mondiskalaj eventoj en Esperantujo estis prezentitaj en Interkultura Mondo.

Ni vizitas danke al Esperanto ankaŭ diversajn unikajn lokojn de nia planedo. Ekzemple, en 2007 ni estis ĉe Bajkalo – la plej profunda sensala lago en la mondo.

Ankaŭ la nomoj mem de Esperanto-aranĝoj sonas agrable – “Renkontiĝo de Amikoj” aŭ “Esperanto-Lingvo Arta” (EoLa). Riĉa kaj amikema estas la internacia lingvo Esperanto, ĉu vi konsentas, karaj legantoj?

Krome, nia rubriko prezentis du Internet-paĝarojn, kiuj temas ĝuste pri Interkulturo: de la projekto mem – www.interkulturo.net kaj la paĝaron IDEO – Interkultura defio por Eŭropo (www.noos.ch/ideo).

Nun la unuaj partoprenintoj de la projekto “Interkulturo” jam estas plenkreskuloj. Tamen la deziro malfermi por si la mondon, mi certas, eĉ pli fortiĝis. Ne ĉiam eblas veturi ien kaj rekte konatiĝi kun lokaj kutimoj, tradicioj, loĝantoj. Sendube vi povas spekti diversajn mondopartojn en via hejmo pere de Interreto. Tamen vidi kaj komuniki tute ne estas la samo! Senperaj homaj interrilatoj donas pli da impresoj kaj vivaj instigoj.

Interkultura Mondo daŭre strebos plivastigi viajn interkulturajn sciojn kaj spertojn, niaj karaj amikoj kaj samideanoj! Ni serĉos por vi interesajn temojn, utilajn spertojn, gravajn informojn. Same vi povas aktive partopreni en la vivo de nia rubriko. Rakontu pri viaj novaĵoj, prezentu viajn landojn, dividu kun legantoj viajn interesajn interkulturajn travivaĵojn! Ĉiu kontribuo bonvenas kaj estos prezota!

Kaj por inspiri vin, ni volas alvoki. ILEI – Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj – strebas renovigi la projekton “Interkulturo” en nova fazo. Unu el ĝiaj valoroj estas vasta gamo de diversformaj kaj diverstemaj aktivecoj. La partoprenantoj povas mem elekti iun temon kaj elpensi komunikadon enkadre de ĝi. Des pli ke hodiaŭ kontaktoj multe pli facilas danke al modernaj teknikiloj. Jam aliĝis grupo el Brazilo. Ĝi estas tre aktiva kaj serĉas pere de Esperanto samaĝajn amikojn tra la mondo. Se vi interesiĝas pri la vivo, kutimoj de tiu lando kun riĉa kulturo, trovu novajn amikojn tra la oceano! Ni alvokas ĉiujn, kiuj interesiĝas pli ekscii pri nia mondo, partopreni la projekton Interkulturo! Ĝi donas bonajn ŝancojn praktiki Esperanton kaj akiri novajn amikojn en diversaj mondopartoj. Kaj *Juna Amiko* ĉiam apogos kaj helpos vin! Skribu al: interkulturo.nova@gmail.com

Rusiaj Esperantaj Tagoj

Saluton, karaj legantoj!

Sendube vi ne unufoje aŭdis klasikan frazon, ke Esperanto funkcias kiel pontolingvo inter homoj.

Ĝi unuigas reprezentantojn de diversaj popoloj, kulturoj, religioj, vivstiloj k.a. Tio kutime evidentiĝas dum internaciaj Esperanto-renkontiĝoj, kiom vi havas la eblecon konatiĝi kun homoj kun la plej diversaj sortoj. Tamen



ankaŭ ne tiom grandaj enlandaj aranĝoj donas elzemplon de unuiganta “eco” de Esperanto.

Hodiaŭ ni rakontas al vi pri unu el tiuj “internaj” renkontiĝoj, kiuj ankaŭ pravas “pontecojn” de la internacia lingvo. Temas pri RET – Rusiaj Esperantaj Tagoj, la ĉefa aranĝo de rusiaj esperantistoj en la jaro. Krome, ĉi-jare RET unuĝis kun la ĉiujara konferenco de REU – Rusia Esperanta Unio.

Okazis RET, eblas diri, en “la koro” de Rusio – en granda Volĝa Regiono. Tie situas kelkaj naciaj respublikoj de la lando: Baŝkirio, Ĉuvaŝio, Respubliko Marij El, Mordovio, Tatarstano, Ŝimariio. Tiuj popoloj apartenas al malsimilaj lingvaj grupoj, diversaj religioj kaj tute malsamaj kulturoj. Jen estas tre taŭga favora tereno por utileco de la internacia lingvo. Ĉu ne? Inter tiuj naciaj respublikoj distingiĝas Ĉuvaŝio, vidpunkte de Esperanta movado.






Heike Pahlow, Lingo4you

Esperanto por ĉiuj!

Kiel facile estus por internaciaj firmaoj, se ĉiuj komprenus Esperanton. Lingo4you estas nur unu ekzemplo.

Kun kvin milionoj da vizitantoj monate sur ĝiaj retejoj, la firmao jam helpas al multaj lernejoj lerni fremdajn lingvojn. Tamen, facila komuna lingvo kiel Esperanto ebligas al pli multaj personoj uzi la servon.

Ekde 2001 nia firmao Lingo4you el Leipzig (Germanio) ellaboras retejojn por lernantoj, kiuj lernas la anglan, francan, hispanan aŭ germanan. Por ke la internaciaj vizitantoj de niaj retpaĝoj pli bone komprenu la klarigojn, ni tradukis la enhavojn al diversaj lingvoj. Sed ne al multaj, ĉar tio kostas multe da



tempo – kaj tempo estas mono. Se ĉiuj komprenus Esperanton, la problemo estus solvita. Do ni decidis mem lerni Esperanton kaj informi niajn vizitantojn pri la bela kaj facila lingvo.

Surbaze de niaj alilingvaj materialoj ni tuj komencis ellabori sur www.lingolia.com germanajn kaj anglajn klarigojn kaj ekzercojn pri la Esperanto-gramatiko. Tiamaniere niaj vizitantoj povas kompari Esperanton kun aliaj lingvoj kaj vidi kiel rapide oni ekzemple lernas la tempojn de verboj.

En *App Store* haveblas intertempe nia apo LingoDaily, per kiu oni ĉiutage ricevas novan vorton kun frazo kaj bildo. Ludante oni rapide lernas la novajn vortojn kaj krom Esperanto oni povas legi kaj aŭdi la frazojn en la angla, franca, germana, hispana, itala kaj rusa.

Por la uzantoj de niaj paĝoj ni ĉiujare preparas elŝuteblan kalendaron kun monataj folioj pri diversaj temoj. Tiu kalendaro kompreneble ankaŭ estas disponebla senpage en Esperanto. Okaze de la jubileo de *Juna Amiko*, mi invitas ankaŭ al vi elŝuti nian kalendaron – por vi mem aŭ por entuziasmigi viajn amikojn lerni tiun utilan lingvon.

Retejo: www.lingolia.com

Kalendaro: <https://www.lingolia.com/en/news/view/calendar-2017>



Kursanoj de Esperanto en Herzberg.
La aŭtorino estas meze.



Lernado

2017



VINTRO

- neĝhomo
- sledo
- glaciopendado
- neĝo
- neĝbulo
- seglifo
- ĝitisuo
- neĝtabulo
- polusa urso
- skio

Esperanto
einfach, kompakt und übersichtlich
von Heide Fritzsche als Fachlehrerin
ISBN: 978-3-96008-386-3

WWW.LINGOLIA.COM

Januaro 2017

1	2	3	4	5	6	7	8	9	10	11	12	13	14	15	16	17	18	19	20	21	22	23	24	25	26	27	28	29	30	31				
Lu	Ma	Me	Ju	Ve	Sa	Di	Lu	Ma	Me	Ju	Ve	Sa	Di	Lu	Ma	Me	Ju	Ve	Sa	Di	Lu	Ma	Me	Ju	Ve	Sa	Di	Lu	Ma	Me	Ju	Ve	Sa	Di

KARNAVALA PROCESIO

- karnavala ĉaro
- flageto
- maskovesto/maskerada kostumo
- festonĝirlando
- bufeda budo
- konfetoj
- klaĉonazo
- klaĉono
- papereperento
- vimplo

Esperanto
einfach, kompakt und übersichtlich
von Heide Fritzsche als Fachlehrerin
ISBN: 978-3-96008-386-3

WWW.LINGOLIA.COM

Februaro 2017

1	2	3	4	5	6	7	8	9	10	11	12	13	14	15	16	17	18	19	20	21	22	23	24	25	26	27	28	29				
Me	Ju	Ve	Sa	Di	Lu	Ma	Me	Ju	Ve	Sa	Di	Lu	Ma	Me	Ju	Ve	Sa	Di	Lu	Ma	Me	Ju	Ve	Sa	Di	Lu	Ma	Me	Ju	Ve	Sa	Di

PARKO

- vojo
- benko
- arbo
- arbusto
- lago
- fontano
- herbejo
- anaso
- fisio
- kolombo

Esperanto
einfach, kompakt und übersichtlich
von Heide Fritzsche als Fachlehrerin
ISBN: 978-3-96008-386-3

WWW.LINGOLIA.COM

Majo 2017

1	2	3	4	5	6	7	8	9	10	11	12	13	14	15	16	17	18	19	20	21	22	23	24	25	26	27	28	29	30	31				
Lu	Ma	Me	Ju	Ve	Sa	Di	Lu	Ma	Me	Ju	Ve	Sa	Di	Lu	Ma	Me	Ju	Ve	Sa	Di	Lu	Ma	Me	Ju	Ve	Sa	Di	Lu	Ma	Me	Ju	Ve	Sa	Di

NASKIGTAGO

- aĝo
- naskiĝtaga donaco
- naskiĝtaga karto
- bukedo
- kandelo
- rubando
- donacpapero
- gastoj
- aerbalono
- banto

Esperanto
einfach, kompakt und übersichtlich
von Heide Fritzsche als Fachlehrerin
ISBN: 978-3-96008-386-3

WWW.LINGOLIA.COM

Junio 2017

1	2	3	4	5	6	7	8	9	10	11	12	13	14	15	16	17	18	19	20	21	22	23	24	25	26	27	28	29	30		
Ju	Ve	Sa	Di	Lu	Ma	Me	Ju	Ve	Sa	Di	Lu	Ma	Me	Ju	Ve	Sa	Di	Lu	Ma	Me	Ju	Ve	Sa	Di	Lu	Ma	Me	Ju	Ve	Sa	Di

FRIZEJO

- harseskigilo
- buklio
- tondililo
- harbroso
- frizistino
- ŝampuo
- kombilo
- harseskiga kasko
- harvosto
- hararango/frizajo

Esperanto
einfach, kompakt und übersichtlich
von Heide Fritzsche als Fachlehrerin
ISBN: 978-3-96008-386-3

WWW.LINGOLIA.COM

Septembro 2017

1	2	3	4	5	6	7	8	9	10	11	12	13	14	15	16	17	18	19	20	21	22	23	24	25	26	27	28	29	30	
We	Sa	Di	Lu	Ma	Me	Ju	Ve	Sa	Di	Lu	Ma	Me	Ju	Ve	Sa	Di	Lu	Ma	Me	Ju	Ve	Sa	Di	Lu	Ma	Me	Ju	Ve	Sa	Di

HALOVENO

- vespereto
- sorĉistino
- sorĉisto
- ĉerko
- fantomo
- monstro
- vampiro
- mumio
- diablo
- homlupo

Esperanto
einfach, kompakt und übersichtlich
von Heide Fritzsche als Fachlehrerin
ISBN: 978-3-96008-386-3

WWW.LINGOLIA.COM

Oktober 2017

1	2	3	4	5	6	7	8	9	10	11	12	13	14	15	16	17	18	19	20	21	22	23	24	25	26	27	28	29	30	31				
Lu	Ma	Me	Ju	Ve	Sa	Di	Lu	Ma	Me	Ju	Ve	Sa	Di	Lu	Ma	Me	Ju	Ve	Sa	Di	Lu	Ma	Me	Ju	Ve	Sa	Di	Lu	Ma	Me	Ju	Ve	Sa	Di



WWW.LINGOLIA.COM

© Lingo4you GbR
mail@lingolia.com

Ilustraĵoj: Stefanie Czapla
www.creature-feature.com

Koloraro: Anna-Sophie Burkhardt

RESTORACIO

- kelnero
- kulristo
- gasto
- manĝokarto
- pieto
- manĝaĵo
- antaŭtuko
- fakturo
- trinkaĵo
- kasmalino

Esperanto
einfach, kompakt und übersichtlich
von Heiko Föllmer als Taschenbuch
ISBN: 978-3-96008-386-3

WWW.LINGOLIA.COM

Marto 2017

Me	Ju	Sa	10	11	12	13	14	15	16	17	18	19	20	21	22	23	24	25	26	27	28	29	30	31	
1	2	3	4	5	6	7	8	9	10	11	12	13	14	15	16	17	18	19	20	21	22	23	24	25	26

PRINTEMPO

- papilio
- rano
- nesto
- ovo
- kokido
- tulipo
- narciso
- lepore
- kokcineolo
- saĥido

Esperanto
einfach, kompakt und übersichtlich
von Heiko Föllmer als Taschenbuch
ISBN: 978-3-96008-386-3

WWW.LINGOLIA.COM

Aprilo 2017

12	13	14	15	16	17	18	19	20	21	22	23	24	25	26	27	28	29	30											
1	2	3	4	5	6	7	8	9	10	11	12	13	14	15	16	17	18	19	20	21	22	23	24	25	26	27	28	29	30

KONSTRUEJO

- gruo
- elkvatoro
- ŝutkamiono
- barajo/barilo
- tubo
- konstrulaboristo
- betonmiksililo
- briko
- trulo
- kasko

Esperanto
einfach, kompakt und übersichtlich
von Heiko Föllmer als Taschenbuch
ISBN: 978-3-96008-386-3

WWW.LINGOLIA.COM

Julio 2017

26	27	28	29	30	31																									
1	2	3	4	5	6	7	8	9	10	11	12	13	14	15	16	17	18	19	20	21	22	23	24	25	26	27	28	29	30	31

SOMERO

- suno
- sunokulvitroj
- hamako
- kuŝseĝo
- palmo
- pikniko
- sunkremo
- glaciaĵo
- plilo
- naĝringo

Esperanto
einfach, kompakt und übersichtlich
von Heiko Föllmer als Taschenbuch
ISBN: 978-3-96008-386-3

WWW.LINGOLIA.COM

Aŭgusto 2017

31	30	29	28	27	26	25	24	23	22	21	20	19	18	17	16	15	14	13	12	11	10	9	8	7	6	5	4	3	2	1
1	2	3	4	5	6	7	8	9	10	11	12	13	14	15	16	17	18	19	20	21	22	23	24	25	26	27	28	29	30	31

AŬTUNO

- kajo
- sciuro
- foliaro
- foliaristilo
- kukurbo
- grapolo
- maizo
- flako
- erinaco
- pluvombrello

Esperanto
einfach, kompakt und übersichtlich
von Heiko Föllmer als Taschenbuch
ISBN: 978-3-96008-386-3

WWW.LINGOLIA.COM

Novembro 2017

44	45	46	47	48	49	50	51	52																						
1	2	3	4	5	6	7	8	9	10	11	12	13	14	15	16	17	18	19	20	21	22	23	24	25	26	27	28	29	30	31

KRISTNASKO

- kristnaska arbo
- kristnaska globetio
- Sankta Nikolao
- nukscrompio
- anĝelo
- adventa krono
- kameno
- lumĝirlando
- kristnaska karto
- kristnaska donaco

Esperanto
einfach, kompakt und übersichtlich
von Heiko Föllmer als Taschenbuch
ISBN: 978-3-96008-386-3

WWW.LINGOLIA.COM

Decembro 2017

44	45	46	47	48	49	50	51	52																						
1	2	3	4	5	6	7	8	9	10	11	12	13	14	15	16	17	18	19	20	21	22	23	24	25	26	27	28	29	30	31



Mireille Grosjean

Neklaraj limoj

Vi prenas ovon. Per ĝi kun fromaĝo, legomoj kaj iom da lakto aŭ kremo vi povas prepari bonegan salitan pladon.

Vi prenas ovon. Per ĝi kun faruno, sukero aŭ mielo kaj aliaj ingrediencoj vi povas baki bonegan dolĉan kukon. Ovo konvenas kaj al salitaj kaj al dolĉaj manĝaĵoj.

Mi estas svisino. Same miaj du filinoj. Mia plej aĝa filino edziniĝis kun kanadano. Konsekvence iliaj du filoj, miaj du nepoj, estas kaj svisoj kaj kanadanoj. Ili estas dunaciuloj.

Oni instruis al mi (en la franca lingvo), ke kamelo havas du ĝibojn kaj ke dromedaro havas nur unu ĝibon. Tamen dromedaro apartenas al la genro de kameloj. Vidu la cigaredojn “Camel”: la besto sur la pakajo estas dromedaro kun unu ĝibo. Ne fumu la cigaredojn!

Descartes, en Esperanto Kartezio (1596-1650), estis franca matematikisto kaj filozofo. Liaj pensoj estis tre klaraj kaj precizaj. Li ŝatis grupigi aĵojn en difinitaj kategorioj. Tio tre influis kaj influas la francan kulturon. Laŭ tio mi lernis, ke io estas aŭ en kategorio A aŭ en kategorio B. Tamen la realo povas esti alia. Rigardu! Laŭ statistiko estas en Japanio 85% da budhistoj kaj 83% da ŝintoistoj (ŝintoismo estas la origina japana religio). Kio okazis? Ĉu eraro? Ne! La pridemanditaj japanoj notis, ke ili estas kaj budhistoj kaj ŝintoistoj. Jen la realo. Multaj japanoj kutimas festi bapton de bebo kaj ge-edziĝon laŭ ŝintoisma rito. Por funebraj ceremonioj multaj el ili iras al budhisma templo. Do ili estas kaj kaj.

En *Juna Amiko* 2016/4 vi legis pri Nepalo. Vidiĝis: en Nepalo estas 90% da hinduistoj kaj 10% da budhistoj. Tamen la realo estas ne tiom simpla. Personoj povas ligiĝi al du religioj senprobleme. Vidu foton en kristana preĝejo en Katmanduo: en katolika templo vidiĝas muro kun ŝrankoj por cindroj de mortintoj (kolombario) kaj hinduismaj simboloj (ruĝa koloro kaj oranĝkolora florĉeno).

Rigardu Armenion. Tiu lando situas sude de la montaro Kaŭkazo. Do oni povas aserti, ke ĝi apartenas al Azio. Ĝi membras en la Konsilio de Eŭropo! Same por Kartvelio kaj Azerbajĝano. Do la limo inter Eŭropo kaj Azio ne estas tiom klara. Denove ni devas ĉi tie forlasi ian rigidan pensmanieron.

Rapide pensu pri malrapida besto: heliko. Ĝi estas kaj vira kaj ina. Ĉiu heliko estas tia. Tamen ili devas esti duope por produkti idojn. Strange, ĉu ne? Tiaj animaloj nomiĝas hermafroditoj per grekdevena vorto, aŭ duseksuloj.

Tiu integra pensmaniero “kaj kaj” aperas ofte en Azio. Eŭropanoj penas kompreni tion.



Foto: la aŭtoro



Luiza Carol

Neĝa infano

Neĝa infano de Liu Si, kun ilustraĵoj de la aŭtoro. Ĉina Esperanto-Eldonejo 1981, 1985. 40 paĝoj.

Tiu ĉi libreto estas porinfana albumo, kiu havas sur ĉiu paĝo belan pentraĵon, faritan de la aŭtoro mem.

La teksto estas fabelo pri neĝa infano, kreita de kuniklino, por ke ŝia propra infano ne sentu sin soleca.

Pere de la belaj pentraĵoj vi povos vidi,



kiel la kuniklido kaj la neĝinfano kunludas en la neĝo, kiel la kuniklido revenas en la domon por ripozi, kiel la tuta domo ekbruliĝas, kaj la kuraĝa neĝinfano sukcesas savi la vivon de la kuniklido. Vi vidos ankaŭ la fajrobrigadistan teamon,

konsistantan el kuraĝaj simioj, kiujn helpas bonkoraj sciuro kaj pasero. La neĝa infano fandiĝas pro la varmo, kiun ĝi alfrontis. Tamen ĝi ne malaperas tute. Ĝi aliformiĝas en akvon kaj la akvo aliformiĝas en nubon. Jen kiel finiĝas la rakonto:

“En la ĉielo aperas bela blanka nubo. ‘Rigardu,

panjo!’ – montrante la nubon, la kunikleto diras, ‘Ĉu ĝi ne estas la neĝa infano? Ĝi ja salute ŝvingas la manon al ni sur la ĉielo!’”

Ĉu vi jam vidis neĝon kiu fandiĝas? Ĉu vi jam vidis akvon kiu vaporigiĝas?

Hori Jasuo

Enigmoj pri Japanio

Invitkato

Azianoj tiamaniere invitas homojn kun sia manplato direktanta suben. Kion tiu kato invitas? Ĝi invitas feliĉon kaj riĉecon. Antaŭe katoj estis ŝatataj de terkulturistoj, ĉar ili forpelas musojn, kiuj manĝas rizon kaj silkraŭpojn. Nun ili ne havas tiajn taskojn, kaj estas ŝatataj kiel invitantoj de feliĉo kaj riĉeco.



Kio estas tiuj paperaĵoj?

En novjaraj tagoj multaj homoj vizitas templojn kaj preĝas por sia feliĉo en tiu jaro. En tiu okazo ili volas scii, kian sorton ili havos, kaj aĉetas oraklobileton. Sur tiuj paperoj estas skribitaj ne nur simple “Granda feliĉo”, “Feliĉo” aŭ malofte “Malfeliĉo”, sed ankaŭ instrukcioj pri vivmaniero. Poste iuj ligas la paperon al tiuj ŝnuroj.



Aŭtorino: Sonmy Álvarez
Tradukisto: José de Jesus Campos



Rapidu, Fito!
Mi havas surprizon por vi.

Kion? Ĉu la abeloj
invitis nin manĝi
mielon?

Ne, pli
bone.

Rigardu

Genie!

Ĉiu aĝo taŭgas por
planti "vivor".

Ĝardeno estas kiel festo
por koboldoj...

...ĉar tero sen plantoj
malĝojigas nin.





2017 – La Jaro de Zamenhof

La kreinto de nia lingvo, d-ro Ludoviko Zamenhof, naskiĝis en 1859, eldonis la Unuan Libron en 1887 kaj forpasis en la 14a de aprilo 1917.

Li do mortis en la malfrua stadio de la granda milito. En junio 1914 li survojis al la deka Universala Kongreso, kiu devus okazi en Parizo. Pro la militeksplozo li devis reiri al sia hejmlando – pena, rondira tri-semajna vojaĝo tra Svedio. Lia fizika sanstato jam ne bonis – li suferis je angino (kor-perturboj); lia mensa stato suferis – lia tuta vivkredo, kiu spronis lin krei Esperanton, centris je nocioj de interrasa kaj interŝtata harmonio kaj la forigo de la kaŭzoj de militoj.

Zamenhof en Varsovio apenaŭ plu havis komunikeblon kun la esperantistaro. Escepto estis la svisa ĵurnalisto Edmond Privat, kiu sukcesis per diplomatia rekomendletero kaj per pena rondvojaĝo tra Ukrainio atingi la polan ĉefurbon. La du viroj renkontiĝis mallonge en januaro 1917, en akompano de Klara, la edzino de Zamenhof. Bedaŭrindege, en la libro de Privat *Aventuroj de Pioniro* la tuta vojaĝo ricevis nur du paĝojn, kun apenaŭ ses linioj pri la renkontiĝo mem.

Tra la jaro 2017 la esperantistoj markos la centjaran jubileon de tiu forpaso, kun solenaĵoj en Bialistoko (lia naskiĝurbo) en la 14a de aprilo, en Berlino en la 21a de aprilo kaj en Varsovio (kie situas lia tombo) en la 28a de aprilo.

La rubrikon
prizorgas:
Stefan MacGill



Respondu la demandojn

- ❶ Kiom da jaroj vivis Zamenhof?
- ❷ Kial Zamenhof ne povis partopreni la Kongreson en Parizo? ❸ Kiel efikis la eksplodo de la granda milito al Zamenhof? ❹ Per kiu dokumento Edmond Privat sukcesis vojaĝi al Pollando? ❺ Kial ni scias malmulton pri la renkontiĝo de Zamenhof kaj Privat?


Vortklarigoj

Escepto: lo, kio ne konformas al normo.
Marki: noti, memori. **Pena:** malfacila
Solenaĵo: formala kunvenado. **Sproni:** instigi, kuraĝigi. **Stadio:** Tempo-parto.



2017 – grava jaro por esperantistoj

Jen krucenigmo pri interesa lando en la koro de Azio. Eltrovu la landon kaj eksciu kelkajn bazajn faktojn pri ĝi kaj ĝiaj religioj.



(R) uzu la radikon (sen finaĵo)

Horizontale →


- La persona nomo de la kreinto de Esperanto. (8)
- Bonodora (5).
- En 1905 la kreinto de Esperanto ___is al la unua E-kongreso en Bulonjo-sur-Marzo en norda Francio. (2)
- La familia nomo de la kreinto de Esperanto. (8)
- Ni ja havas fotojn de la kreinto de Esperanto, eĉ vaks-cilindran voĉ-registriĝon, sed la kvalito modestas, ĉar en tiu tempo la bezonataj _____oj estis nur en frua evoluo. (6 R)
- Reganto, kutime vivlonga kaj hereda. Proverbo de la kreinto de Esperanto: '_____ donacis, sed polico minacas.' (4)
- Hundoblek! (3) Proverbo de la kreinto de Esperanto: '___as hundido, ĉar tiel faras la hundo.' (3 R)
- La profesio de la kreinto de Esperanto. (8)
- La 'nomulo' de ĉi tiu enigmo faris _____ kontribuon al la proksimigo de la samideanaro kaj al la celo de monda paco. (5)

Vertikale ↓

- Ĉu eble la _____ de la kreinto de Esperanto estis la troa fumado? (4 + 4)
- En la fino de la 19a jarcento, la sorto de virino estis ĉefe _____. (servi en la hejmo). Feliĉe la edzino Klara ne konformis plene al tio, sed kontribuis al la movado. (4 + 4)
- La meza nomo de la kreinto de Esperanto.

- Proverbo de la kreinto de Esperanto: 'Kiu _____ groŝon, perdas la tutan poŝon.' Sed por nia enigmo, uzu la imperativan formon de tiu verbo. (6)
- Proverbo de la kreinto de Esperanto: 'Lecionoj al profesoro estas _____ laboro.' (4)
- Proverbo de la kreinto de Esperanto: '_____ doloras, pri tio ni ploras.' (3)
- Lokon, kie oni gardas senparencajn infanojn. (7)
- Mallongigo: Hejtata Tranoktejo -- Bialistoka Studenta Domo. (5)
- Kiam mortis la kreinto de Esperanto en la 14a de aprilo 1917 en Varsovio, la Ligo de Nacioj estis ankoraŭ fond_____. (3)
- La fil__o de la kreinto de Esperanto, Lidia, prelegvojaĝis tra multaj landoj en kaj pri Esperanto.

Solve el la antaŭa numero





Landaj Rezentantoj – Perantoj de Juna Amiko

Argentino: info@esperantoargentina.org. **Aŭstralio:** Aŭstralia Esperanto-Asocio, G.P.O. Box 2122 Melbourne 3001, Australia; info@esperanto.org.au. **Aŭstrio:** Leopold Patek, Martinstr. 104/38, AT-3400 Klosterneuburg, Austria; aon.913548977@aon.at. **Belgio:** Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, BE-2000 Antwerpen, Belgium; financoj@fel.esperanto.be. **Brazilo:** Brazila Esperanto-Ligo, SDS Bl. P 36, Ed. Venâncio III, sala 303, BR 70393-902 Brasília-DF, Brazil; belabutiko@esperanto.org.br. **Britio:** Esperanto Association of Britain, Esperanto House, Station Rd, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DE, United Kingdom; eab@esperanto.org.uk. **Bulgario:** Mariana P. Evlogieva, PK 973, BG-1000 Sofia, Bulgaria; mrvp@interpres.org. **Ĉeĥio:** Pavel Polnický, Na Vinici 110/10, CZ-290 01 Poděbrady II, Czech Republic; cea.polnický@quick.cz. **Ĉilio:** Héctor Campos Grez, Casilla 231 Curico, Chile. **Ĉinio:** Gong Xiaofeng, School of Environmental and Chemical Engineering, Nanchang University, Nanchang, CN-330031, China; arko.gong@qq.com. **Danio:** Arne Casper, Bryggervangen 70 4 tv, DK-2100 Koebenhavn, Denmark; arnecasper@dbmail.dk. **Estonio:** Ahto Siimson, Kastani 12-11, Paikuse, EE-86602 Pärnu maakond, Estonia; ahto.siimson@esperanto.ee. **Finlando:** Hämäläinen Sylvania, F.E.Sillanpään katu 2 C 46, FI-33230 Tampere, Finland; sylvia.h@kolumbus.fi. **Francio:** Unuiĝo Franca por Esperanto, 4bis, rue de la Cerisaie, FR-75004 Paris, France; zav@esperanto-panorama.net. **Germanio:** Esperanto-Buchversand, Dr. Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Str. 9, DE-55129 Mainz, Germany; wolfgang.schwanzer@esperanto.de. **Germanio:** Zsófia Kóródy, Interkultura Centro Herzberg, Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg am Harz, Germany; zsofia.korody@esperanto.de. **Hispanio:** Pedro Garrote, Apartado 119 Esperanto, ES-47080 Valladolid, Spain. **Hispanio:** Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 1008, ES-08200 Sabadell, Spain. **Hungario:** HEA, Thokoly ut. 58-60, II/209, HU-1146 Budapest; hungario@gmail.com, www.esperantohea.hu. HEA vendas surloke unuopajn numerojn por la kuranta jaro po 500 ft., duono de la kutima abonprezo. Plia peranto: Boris Arrate Veranes, Emma u. 3a, HU-2030 Érd, Hungary; simio_2004@yahoo.es. **Islando:** Islanda Esperanto-Asocio, Pósthólf 1081, Skolavorðustigur 6B, IS-101 Reykjavík, Iceland; esperanto@isl.is. **Israelo:** Gian Piero Savio, Rehov Menora 13/4, IL-53490 Givatajim, Israel; saviogp@zahav.net.il. **Italio:** Luigia Oberrauch Madella, via Prampolini 8, IT-43122 Parma, Italy; silkovojo@aliceposta.it. **Japanio:** Japana Esperanto-Instituto, Japana filio de ILE, JP-162-0042 Tokyo-to, Sinzyuku-ku, Waseda-mati 12-3, Japan; esperanto@jei.or.jp. **Kroatio:** Marija Belošević, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb, Croatia; marija@hes-keu.hr. **Kubo:** Kuba Esperanto-Asocio, Apartado Postal 5120, CU-10500 La Habana 2, Cuba. **Litovio:** Litovia Esperanto-Asocio, ab/k 167, LT-3000 Kaunas, Lithuania; irenaa@takas.lt. **Norvegio:** Anne Karin Bondhus, Morenefaret 8 A, NO-4340 Bryne, Norge; akbondhus@jkn.no. **Nov-Zelando:** David Dewar, PO Box 35849, Browns Bay, Auckland 0753, New Zealand; gddewar@ihug.co.nz. **Pakistano:** Jawaid Eahsan, P.O. Box 26, PK-60000 Multan, Pakistan. **Pollando:** Magdalena Tatara, Koźmicie Wielkie 323, PL-32-020 Wieliczka, Poland; mtatara@gmail.com. **Portugallio:** Portugala Esperanto-Asocio, Rua Dr. Joao Couto 6. R/C A, PT-1500 Lisboa, Portugal; asocio@esperanto.pt. **Rumanio:** Crancau, Ioan, B-dul Bucuresti 5/53, RO-4800 Baia Mare, Romania. **Rusio:** Halina Gorecka, ab. ja. 1205, RU-236039 Kaliningrad, Russian Federation; sezonoj@mail.ru. **Serbio:** Zoran Ćirić, Branka Miljkovića 14, RS-18000 Niš; zciric2@gmail.com. **Slovakio:** Peter Baláž, Vítazná 840/67A, SK-958 04 Partizánske, Slovakia; petro@ikso.net. **Slovenio:** Višnja Brankovič, Via Parini 5 IT-34 129 Trieste, Italy. **Sud-Afriko:** Colin Beckford, C2 Plaza Hill 3, Bower Road, ZA-7800 Wynberg, South Africa. **Svedio:** Leif Holmlund, Kågevägen 40 B lgh 1303, SE-931 38 Skellefteå, Sweden; leif.holmlund@telia.com. **Svislando:** Christoph Scheidegger, Im Schleedom 6, CH-4224 Nenzlingen, Switzerland; ch_scheidegger@bluewin.ch. **Tajvano:** Reza Kheirkhah, No. 105, Chung Ching Road, Pingtung, 900-73 Taiwan; rezamenhof@yahoo.com. **Togo:** Koffi Gbeglo, B. P. 13169, Lome, Togo; esp.togo@cafe.tg. **Usono:** Esperanto-USA, P.O. Box 1129, El Cerrito CA 94530, United States; eusa@esperanto-usa.org. **Venezuelo:** Peter Jaimez, Poŝtkesto 3482, VE-1010 A Caracas, Venezuela. **TUTA MONDO:** Abonservo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Netherlands; uea@uea.org. **Mendojn eblas sendi ankaŭ al ILEI.officejo@gmail.com.**

Ĉiuj numeroj de Juna Amiko "malpli junaj" ol unu jaron, elŝuteblas ĉe



